

Solenaĵoj de la 80-jariĝo
de la Esperantista Klubo en Praha

La solena renkontiĝo de esperantistoj en Praha okaze de la 80-a datreveno de fondiĝo de Esperantista Klubo en Praha okazos en Kulturdomo GONG en Praha 9, Sokolovská strato 969. La renkontiĝo okazos sabate la 23-an de oktobro 1982 kaj dimanĉe la 24-an de oktobro 1982 kun jena programo:

sabate la 23-an de oktobro:

10.00 – 12.00 solena kunveno

14.00 – 17.00 kultura programo, en kiu prezentos sin prof. Sádlo, E-trio (Eva Seemannová kaj geedzoj Budínský), s-ano Deke el GDR, s-ano Smyčka, Spořilov – kvarteto kaj infan-horo

19.30 – 23.00 vespero kun muziko kaj danco, dum kiu prezentos sin la esperantista grupo Barbuloj,

dimanĉe la 24-an de oktobro:

9.30 – 12.00 h ekskursoj tra Praha laŭ via elekto.

La partoprenkotizo kostat 25 Kčs, tranoktado por du noktoj 70 Kčs. La sumojn estas necese pagi ĝis la 15-a de septembro 1982. La kulturdomo Gong estas atingebla per tramoj n-roj 3, 8, 15 kaj 19.

x x x

La okdekjariĝo de la Esperantista Klubo en Praha estas grava jubileo ne nur de la praga esperantistaro, sed sendube de la tuta ĉeĥa kaj ĉeĥoslovaka Esperanto-movadoj. Kiel la historio de la ĉefurbo Praha egalas samtempe al la historio de la tuta ĉeĥa nacio, same ankaŭ la historio de la Esperantista Klubo en Praha estas kvazaŭ koncentrita historio de la tuta nialanda movado. Kompreneble Praha ne estas kaj neniam estis la sola fokuso de nia movado – la unua ĉeĥa lernolibro de Esperanto aperis en Pardubice, la dua en Bystřice pod Hostýnem, la unuaj kluboj en nia lando estis en Příbor kaj Brno ktp. – tamen eblas diri sen troigo, ke la Esperantista Klubo en Praha ĉiam apartenis al la ĉefaj koonoj de la Esperanto-movado en nia lando.

Ju pli forta kaj agema estis la klubo, des pli forta kaj vivoplena estis la tuta movado, kaj male la periodoj de malprogreso kaj stagnado de la klubo estis samtempe malfavoraj ankaŭpor la tuta movado. Tio estas tute natura kaj komprenebla fenomeno: ju pli grandaj kaj fortaj estas la unuopaj kluboj kaj grupoj en la tuta lando, des pli granda kaj forta estas la landa movado kaj ĝia tutlanda asocio. Pro tio la ĉefa tasko kaj devo de ĉiu praga esperantisto estas subteni la klubon kaj aktive partopreni en ĝiaj laboroj.

Sole tiamaniere oni povas subteni la tutlandan movadon kaj samtempe la movadon tutmondan. Sidi hejme kaj neglekti la klubon ne estas la ĝusta vojo!

Unu el la plej oftaj motivoj de nepartopreno en la kluba vivo estas la netaŭgeco kaj malproksimeco de la klubejo. Sed ankaŭ tiu ĉi malfavora fakto povus ŝanĝiĝi, se la klubo estus pli granda kaj forta. La klubo nun ricevis de la Nacia Komitato plian ĉambron, malgrandan por klubkunvenoj, sed sufiĉan por kursoj, komitatkunvenoj, junulara sekcio ktp. la ejo situas en la centro de la urbo, proksime al la asocia oficejo. Sed povas esti, ke la klubo baldaŭ havos alian ĉambron, pli grandan kaj konvent por sia agado. Tiam ĝi bezonos kunlaboron de ĉiuj siaj membroj kaj ankaŭ de aliaj esperantistoj, kiuj ĝis nun ne fariĝis membroj de la klubo. Ni ĉiuj kunagu por tio, ke en la novan jardekon de sia ekzisto ekpaŝu la Esperantista Klubo en Praha kun novaj forte kaj entuziasmo.

(-tera)

La lingvo devas esti parolata!

Multe da homoj lernas Esperanton, sed ne ĉiuj estiĝas esperantistoj, ĉar ili opinias, ke ili ellernis la lingvon sufiĉe, eĉ se iliaj scioj estas nur supraĵaj. Sed fakte devas esti male. La lingvon oni devas ĉiam perfektigadi plu kaj praktike uzadi. Post la kurso por komencantoj estas rekomendinde partopreni la kurson por progresintoj kaj laŭeble ian specialan kurson. Por atingi grandan provizon da vortradikoj necesas multe legi Esperanto-gazetojn kaj librojn, aŭ traduki lecionojn el la nacia lingvo al Esperanto. Ankaŭ dum la taga vivo kaj laboro estas necese pripensi, kiel esas eble diversajn aferojn kaj aĵojn diri Esperante.

Tre multe utilas la aŭskultado de radio-disaŭdigoj en Esperanto. Tiamaniere ni povas ĝui interesan programon kaj bonan Esperanton (vidu programojn en Heroldo de Esperanto, Starto kaj aliaj gazetoj).

Sed la ĉefa tasko por flue posedi la lingvon estas **p a r o l i** Esperante. Unu el la plej agrablaj kaj oportunaj eblecoj paroli Esperante estas la regula vizitko de klubaj kunvenoj. Ĉi tie povas ĉiu perfektigi la lingvouzon kaj lingvoscion praktike, parolante, aŭskultante, kantante kaj amuzante kun landaj aŭ eksterlandaj samideanoj. Tie oni lernas paroli flue, parkere kaj senpere, sen antaŭa traduko en la menso. La klubaj programoj estas interesaj kaj klerigaj. Pri tio zorgas la estraro de la klubo kun la anaro.

Vera ĝuo estas internaciaj renkontiĝoj, ekskursoj kaj kongresoj, kie partoprenas diversaj nacioj kaj kie oni trovas novajn amikojn por eksterlanda korespondado, interŝanĝado de bildkartoj, poŝtmarkoj kaj aliaj kolektaĵoj, eble eĉ por reciproka eksterlanda vizito.

Kvankam Esperanto estas jam disvastigita tutmonden, ni ĉiuj devas laŭ propra ebleco zorgi pri ĝia pli rapida popularigo kaj propagando almenaŭ per la insigno, por ke kresku ĉiulande la nombro de esperantoparolantoj kaj esperantofavorantoj tiel, ke

ĉiu ĉiujn komprenos,
ĉar Esperanton posedos.

La nuna tempo estas por Esperanto favora, sed iniciati devas plue kaj unue la esperantistoj mem.

Ju pli da esperantistoj en ĉiu lando, des pli facila estos la interkompreniĝo kun aliaj nacioj kaj nacioj, des pli valora estos la posedo de Esperanto.

(Jan Kukačka)

A t e n t o n ! Aŭskultu ĉiutage la Esperanto programojn de Radio Polonia.

Ili estas elsendataj kvinfoje tage (laŭ la mezeŭropa – do vintra – tempo):

06.30 – 07.00 41,27 48,90 50,04 75,85 200 metroj (t.e. 7270, 6135, 5995, 3955 kaj 1503 kilohercoj)

12.00 – 12.25 31,50 41,99 metroj (9525 kaj 7145 kilohercoj)

17.30 – 17.55 41,18 49,22 metroj (7285 kaj 6095 kilohercoj)

20.30 – 21.00 41,18 49,22 metroj (7285 kaj 6095 kilohercoj)

22.30 – 22.55 41,18 49,22 50,04 75,85 200 metroj (7285, 6095, 5995, 3955 kaj 1503 kilohercoj).

Aŭskultu kaj skribu al: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, 00 950 Varsovio, Box 46, Polso – Pollando

TUTMONDA ASEMBLEO POR LA PACO KAJ VIVO, KONTRAŬ LA NUKLEA MILITO

En la plenkusido de la buroo de la Tutmonda Packonsilantaro en januaro 1982 en Kopenhago estis esprimita postulo, ke en Ĉeĥoslovakio estu aranĝita Tutmonda Packongreso en la jaro 1983. Tiu ĉi decido estas granda honoro por la ĉs. pacmovado, ĝi estas rekono de ĝia partopreno en la tutmonda strebado por la konservo kaj firmigo de la paco.

En la tagoj de la 9-a ĝis la 12-a de marto 1982 la prezidanto de la Tutmonda Packonsilantaro Romeŝ Ĉandra vizitis Pragon. Li traktis kun la reprezentantoj de la ĉs. pacmovado pri la preparuj de la mondkongreso. K-don Ĉandra akceptis la prezidento de Ĉeĥoslovakio G. Husák kaj la vicprezidanto de CK de Nacia Fronto de ĈSSR kaj prezidantaro de TPK T. Trávníček. R. Ĉandra partoprenis la pacmanifestacion kontraŭ la febra armado en Terezín. En sia parolado li alte pritaksis la ĝisnunan aktivecon de la ĉs. pacmovado kaj ĝia kontribuon al tutmonda paco, kaj esprimis konvinkon, ke la proksimiĝanta Tutmonda Packongreso estos plua signifa paŝo en la batalo kontraŭ la militdanĝero. El la traktadoj de R. Ĉandra kun la reprezentantoj de la Ĉs. Packomitato rezultis, ke la Kongreso emfazos la likvidon de la danĝero de nukla milito – ja en la jaro 1983 laŭla decidoj de NATO estas lokotaj la novaj usonaj mezdistancaj nuklaj raketo jen la okcidenta Eŭropo.

La 13-an de majo 1982 estis fondita la ĉs. preparkomitato de la Monda Packongreso en ĉeesto de prezidanto de TPK Romeŝ Ĉandra. Prezidanto de la ĉs. preparkomitato fariĝis vicprezidanto de CK de Nacia Fronto de ĈSSR prof. Tomáš Trávníček, vicprezidanto fariĝis akademiano Bedřich Švestka, prezidanto de la Ĉs. packomitato. Estis decidite, ke la monda kongreso okazos sub titolo „Tutmonda Asembleo por la Paco kaj Vivo, kontraŭ la Nuklea Milito“ en la tagoj de la 15-a ĝis la 19-a de junio 1983 en la praga Palaco de Kulturo. Oni antaŭvidas, ke la mondasembleon partoprenos pli ol 2000 delegitoj kaj gastoj, el tio 1500 el eksterlando. Membroj de la ĉs. preparkomitato estas laboristoj, verkistoj (Z. Pluhař), sciencistoj (B. Kvasil, V. Kellö), artistoj (T. Bartfay), reprezentantoj de plej signifaj soci-organizaĵoj kaj de ŝtataj organoj. La preparkomitato aprobis formigon de gvida komisiono, de laborkomisionoj kaj laboraj plenumgrupoj kaj la procedon en la preparuj de la mondasembleo.

En la sekvanta preskonferenco R. Ĉandra emfazis, ke la mondasembleo okazos en serioza kaj danĝera tempo, ĉar la nuna Minko al la vivo sur la tuta planedo estas tiel granda, kiel neniam antaŭe. En plenkusidoj, en komisionoj, ĉe ronda tablo kaj en pluaj grupoj oni diskurs pri larĝa spektro de problemoj, kiujn la homaro sentas plej brulige. Laŭ R. Ĉandra en proksimaj tagoj oni dissendos al ĉiuj regionaj kaj naciaj pacorganizaĵoj proponojn pri la diskuttemoj en la mondasembleo, ekz. la militdanĝero rilate al unuopaj kontinentoj kaj regionoj, la militdanĝero kaj la eŭropa sekureco kaj kunlaboro, zonoj sen atomarmiloj, psikologiaj konsekvencoj de la militdanĝero, kunlaboro de UNO kaj de neregistaraj organizaĵoj ktp.

La Tutmonda Asembleo en Prago estas ankaŭ afero nia, de esperantistoj. Jam de la plej frua komenco de Esperanto D-ro Zamenhof kunligis la aferon de la Internacia Lingvo kun la afero de la paco. „Sub la sankta signo de l' espero kolektiĝas pacaj batalantoj ni kantas en nia himno kaj ni faros ĉion por pruvi, ke ni pacaj batalantoj vere estas. Al la temoj de la paco kaj de la batalo por ĝi ni dediĉos pli multe da tempo en niaj klubkunvenoj kaj pli da spaco en nia bulteno, nian informan agadon ni direktos al la rilatoj inter la Esperanto-movado kaj pac-movado kaj ankaŭ niajn montrokestojn ni ornamos tiucele. Ni faros ĉion eblan, kun kun aliaj pacbatalantoj, por defendi kaj sekurigi la firman eternan pacon.

Esperantisté fotoamatéři!

Seznamte se s podmínkami fotosoutěže „Fotografie v boji za mír“, kterou vyhlásil ČSMV. Tématem soutěže je zobrazit boj československého lidu za mír ve všech jeho podobách. Pro nás esperantisty to znamená fotografií seznámit širší veřejnost s naší prací v oblasti mezinárodního přátelství a boje esperantistů za světový mír!

Podmínky soutěže:

1. Formát soutěžních snímků 18x24 až 24x30 cm, lesklý povrch. Na zadní straně snímku je nutno uvést: název fotografie, datum zhotovení (nesmí být starší dvou let), jméno, věk a povolání autora, adresa.
2. Osoby, zachycené na snímcích musí souhlasit s uveřejněním v tisku a na výstavách.
3. Lze zaslat nejvýše 20 snímků. Fotosoubory do šesti snímků budou přijaty jako snímek jeden.
4. Snímky oceněné cenou 1-3 se stávají majetkem pořadatelů. Další snímky si mohou pořadatelé ponechat za úhradu a zachování autorských práv.
5. Soutěžní práce zasílejte na adresu: Svaz českých fotografů, Kalininova 43, 130 00 Praha 3.

KONEČNÝ TERMÍN UZÁVĚRKY SOUTĚŽE JE 30. 11.1982.

Podrobnější informace podá pořadatel.

Propozice soutěže jsou uveřejněny v časopisu „Mír“ č. 5/1982.

Obracíme se na vás, přátelé esperantisté fotoamatéři, zapojte se i vy!

Za světový mír!

Sekce MEM a aktivisté Středočeského kraj

Všem schopným překladatelům!

Všichni máme zájem na tom, aby esperanto bylo nejen námi, ale i ostatní veřejností uznáváno za rovnoprávný jazyk – a to i v oblasti beletrie, poezie a umělecké publicistiky. Komise ČES pro tisk a informace zajistila vyspělým esperantistům možnost zúčastnit se soutěže překladatelů. V našem případě jde o překlady původních esperantských textů do češtiny. Téma soutěže vypsané Sdružením českých překladatelů při Českém literárním fondu je přímo předurčeno pro překlady původních esperantských textů z Vietnamu, z naší literární přílohy Panorama nebo z časopisu Paco:

PŘEKLADEM K POROZUMĚNÍ MEZI NÁRODY

Žánrové vymezení:

- 1) Beletristická próza (povídka, úryvek z románu, apod.)
- 2) Poezie (jedna nebo několik básní)
- 3) Umělecká publicistika

Rozsah přihlášených prací:

- 1) Próza a umělecká publicistika (10-20 stran strojopisu)
- 2) Poezie (100-200 veršů)

Přihlásit se mohou pouze původní práce, které neprošly redakční úpravou. Zúčastnit se mohou pouze ti překladatelé, jejichž dosud publikovaná překladová tvorba nepřekročila počet **dvou** samostatných realizovaných knižních titulů.

Soutěžní práce budou přijímány do 31.12.1982 v sekretariátě Sdružení českých překladatelů (adresa níže).

Soutěž je anonymní, účastníci označí všechny exempláře překládané práce pouze svým heslem a přiloží k nim zalepenou obálku s vloženým jménem. Obálku označí opět svým heslem.

Podmínky pro zaslání prací:

Práce se odevzdá ve třech exemplářích, psaných strojem. Ke každé soutěžní práci musí být přiložen text v originále ve formě 3 fotokopii příslušné části výtisku originálu které je nutno opatřit bibliografickými údaji (jméno a příjmení autora, název díla v esperantu, nakladatelství, místo a rok vydání; u sborníků též název sborníku).

Přihlášení do soutěže je možné pouze formulářem přihlášky do soutěže, zaslané do 31.10.1982 na adresu: Sdružení českých překladatelů, Anenské nám. 2, 110 00 Praha 1.

Výsledky soutěže budou vyhlášeny do 31. 5. 1983.

Formuláře přihlášky lze obdržet na výše uvedené adrese. Mnoho zdaru v soutěži vám přeje

Jaroslav Klement – vedoucí komise pro tisk a informace ČES, Karel Kýr – pracovník komise

BULTENO DE EKP (loka grupo de ĈEA), pk. 1069, Praha 1

Redaktas: Kultura komisiono ĉe EKP-komitato. Praha, aŭgusto 1982.

Praha-ek-1982-09-04

BULTENO PRAHA 1982

- 04 -

LOKA GRUPO DE ĈEA

septembro 1982

JUNULARA PAĜO – JUNULARA PAĜO – JUNULARA PAĜO – JUNULARA PAĜO – JUNULARA PAĜO

Datrevena informa pri agado de la Junulara Sekcio ĉe Esperantista Klubo Praha

La 1-an de junio 1981 estis fondita – oni povas diri, ke denove fondita – Junulara Sekcio ĉe EK Praha. Pro diversaj kaŭzoj lastatempe antaŭ tiu ĉi dato la junularo ne laboris kaj fakte ne ekzistis.

Sed unu afero estas organiza ago kaj alia afero estas efektiva agado. Dum la jaro ni alvokis kaj varbis anojn kaj kunlaborantojn pere de aparta tiel nomata „Junulara paĝo“ en la kluba bulteno. Sed ŝajnas, ke la rezulto ne estis konvena. Kvazaŭ ne ekzistus junaj anoj de nia klubo, kaj se ili ekzistas, ne volas kunlabori. Ni varbis membrojn en ĉi-jaraj bazaj kursoj, kiujn partoprenis sufiĉe da gejunuloj. Sed la tutan kurson finis nur malpli granda parto de la kursanaro kaj en la klubon venis preskaŭ neniu el ĝi. Estas klare, ke ekzistas gravaj malfacilaĵoj sufiĉe konataj al ĉiu klubano, sed en la kadro de niaj ebloj ni penis kaj penos preparadi interesajn programojn por niaj kunvenoj. Oni povas diri, ke tamen formiĝis grupo da „fideluloj“ kaj nun ĝi kreas la bazan kernon de nia sekcio.

Dum la jaro ni preparis por ceteraj klubanoj dufoje projekciadon de lumbildoj kaj el enlando kaj el eksterlando. Sukcesa estis nia Silvestra vespero kun aŭtentika rakontado pri eksterlandaj kristnaskaj kaj novjaraj kutimoj, montraĵo de interesa sportbranĉo karateo kaj kantado de pastoreloj. Ekde la jaro 1982 ni kunvenadas regule ĉiun lastan lundon en monato kaj unu el la plej sukcesaj programoj estis prelego de s-ano Haszprunar pri esperantistoj – radioamatoroj kun sonbendigita montraĵo de ilia interparolo en etero.

Esperanta vivo de la membroj de nia sekcio okazas ne nur en klubejo. Niaj reprezentantoj partoprenis diversajn E-aranĝojn. Ni ekzemple partoprenis la 1-an Renkontiĝon de esperantistoj en Příbram kaj Renkontiĝon de junularo en Příbylina. Unu el ni ĉeestis pasintjare Someran Esperantistan Universitaton en Gyula en Hungario kaj SET en Lančov. Regule iu el ni vizitadas ĉiujaran renkontiĝon en Mnichovo Hradiště. Ni estas ankaŭ fieraj, ke nia estro partoprenis kiel delegito de EK Praha la 4-an kongreson de ĈEA en Pardubice. Nia sekcio volas kunlabori kun junularaj grupo jen socialismaj landoj.

Nuntempe ni ligis kontaktojn kun Turisma Esperantista Klubo en Poznań. En estonteco certe estiĝos ebloj de reciproka vizito.

Ni devas diri, ke niaj membroj ne estas nur praganoj. Nuntempe havas nia sekcio viglan „filinon“ en proksima urbo Říčany. Ĉar gejunuloj el Říčany ne povas regule veturadi al Zahradní Město, ili kunvenadas aparte – eĉ ĉiusemajne – en la loko de sia leĝejo. Ni komune preparas programojn kaj komunajn aranĝojn. (La grupo en Říčany certe baldaŭ fariĝos memstara loka grupo de ĈEA. – Rim. de red.)

Ĉiu komenco estas malfacila, sed ni pensas, ke malgraŭ malfavoraj kondiĉoj iom post iom nia membraro kreskos kaj nia agado fariĝos pli vigla kaj pli interesa.

Estraro de Junulara Sekcio
ĉe EK Praha

Kiam mi vizitis vin

(Když jsem k vám chodíval)

Tradukis Miloš Lukáš

Kiam mi vizitis vin trans arbar',
ah, ho ve, trans la arbar',
estis vi pli gaja, ho, mia kar',
pli gaja, ho mia kar'!
/: Sed de nun vi pala estas, :/
ĉu la kor' dormi vin ne permesas,
ah, ho ve, ne permesas.

Vizitante vin trans la laget',
estis vi simila al la rozet',
simila al la rozet'.
/: Sed de nun vi pala estas, :/
ĉu la kor' dormi vin ne permesas.

Vizitante vin sur la korte,
estis vi plena da san' kaj forte,
ah, ho ve, san' kaj forte.
/: Sed de nun vi pala estas, :/
ĉu la kor' dormi vin ne permesas?

Venante viziti vin al fenestro,
estis jam tie la arbarestro.
/: Trans la arbar' li foriris, :/
kaj mia karulin' malĝojiĝis.

JUNULARA PAĜO – JUNULARA PAĜO – JUNULARA PAĜO – JUNULARA PAĜO – JUNULARA PAĜO

El la lingva kuirejo

Siatempe iu stranga (ĉu?) legante skribis al la aŭtoro de „lingva angulo“, ke li legas en Starto kun aparta intereso sole tiujn lingvajn angulojn. Kaj ke la aŭtoro koncentru sian lingvanglemon ankaŭ al certaj vortoj, kiuj al komencantoj kaj moderprogresintoj pro sia simileco skriba aŭ senca kaŭzas ioman embarason.

Ekzemple: kio estas **kvieta** kaj kio **trankvila**?

Do: **trankvila** ekzistas en Esperanto jam de la komenco, ĝi estas vorto „fundamenta“. La Universala vortaro de Zamenhof ne havis la unuan el la du vortoj. Dum la disvolvado de Esperanto tamen mankis nuanc-esprimo por certaj fenomenoj kaj iu do proponis, oni ekuzis kaj poste eĉ oficialigis la vorton **kvieta**. (Cetere, nenio kontraŭzamenhofa – Zamenhof mem ja apartenis inter neologismemulojn.)

Kia estas la diferenco inter la du vortoj? La diferenco ekzistas, ie sufiĉe granda, ie nur iometa, kaj ĉe iu okazo ambaŭ vortoj sin reciproke kovras, laŭsence. Ni vidu sur la ekzemploj (plejparte el PIV):

Trankvila: klidný (bez starostí). Estu trankvila, mi baldaŭ pagos al vi! Konscienco trankvila estas bona dormilo (Z). Lasu min trankvila! (Nech mě v klidu, dej mi pokoj!), Trankvila voĉo, dormo, spirado, diskutado. Trankvile labori. Post dorma trandilo venas bona konsilo (Z). Anima trankvileco (duševní klidnost, klid). La kuracisto trankviligis (uklidnil) la pacienton. Trankviligaĵo – uklidňující prostředek, lék; fakesprime: sedativo.

Mal-: maltrankvila movo; maltrankvila atendi respondon.

Ĉar en la komenco ne ekzistis „kvieta“, Zamenhof uzis „trankvila“ ankaŭ ĉe vetero: En trankvila vetero ĉiu remas sen danĝero.

Kvieta: klidný, poklidný, pokojný, tichý, mírný (dependas de la vorto, al kiu „kvieta“ rilatas). Kvieta vetero, lago; kvieta akvo ŝiras la bordojn: tiun proverbon egalas la ĉeĥa „tichá voda břehy mele“; kvieta pluvo (sen flankefiko de vento) – tichý déšť; kvieta nokto, vento, strato (senbrua), lumo (ne laciga), kamparo, malĝojo (ne senespera) – tichý smutek. – Tamen la konata kanto Tichá noc estas esperantigita jene: Paca nokt', sankta nokt'. Kvieta homo, kvieta besto (nekolerema, pacema, malsovaĝa).

Kvieteco: klid, poklidnost. La kvieteco de la nokto karesis la animon. Pluveto kvietigas (tiŝi, zklidňuje) ventegon. Kvietigi doloron, soifon (utiŝiti).

Kvietigi en la senco malsovaĝigi: krotiti. Kvietigi serpentin, sovaĝan beston. Kvietigisto de sovaĝaj bestoj (krotitel). Kvietiga drogo (uklidňující droga).

Malkvieta: lago, maro, spirito.

x x x

Alitema rimarko, rilata al la „sovaĝa“: pli trafa estas la kunmeto sovaĝanaso (divoká kachna) anstataŭ sovaĝa anaso ĉe la birdo vivanta en nature: tiu besto ja estas trankvila, kvieta, „nesovaĝa“, kaj la adjektivo esprimas nur ĝian neapartenon al homa hejmo; male, eĉ hejma anaso, do „malsovaĝanaso“ povas fariĝi momente „sovaĝa“, sovaĝkonduta, se io furiozigas „ĝin“.

x x x

Oni atentu ankaŭ ne miksi la vortojn, kiuj laŭ aspekto estas similaj (samsonaj, tiel nomataj paronimoj), sed ilia signito estas malŝanĝebla. Jen kelkaj:

fundo – do, dondo – založení; fundamento – základ;

gaja – veselý, ĝoja – radostný; gojo góji (slanga juda nomo por nejudoj);

germana – německý, ĝermana – germánský;

ĝusta – správný, justa – spravedlivý; ĵusa – právě minulý, právě minuvší. Ĝuste la ĵusa kazo povis vin konvinki! Právě tenhle (právě prožitý) případ mohl vás přesvědčit);

lango – jazyk (tělesný orgán), lingvo – jazyk, řeč
kurso – kurs, běh (školení, lekce); kurzo – kurs (valut)
maĉo – žvýkání; matĉo – zápas, match, mač
mastro – pán, hospodář; mastri – ovládat; majstro – mistr
nobla – šlechtyný; nobela – šlechtický; nobelo – šlechtic. Nobelo, kiu ne havas noblan (ušlechtilý) karakteron.
ordo – pořádek, řád; ordono – rozkaz, příkaz; ordeno – řád, vyznamenání (odznak); řád (mnišský, apod.). Řád ve smyslu stanovy, pravidla: regularo (ekz. Kongresa regularo de UEA)
pezi – vážit (kolik?), mít váhu; pesi – vážit (koho, co?), odvažovat (na váze); pezilo – závaží; pesilo – váha (přístroj)
polvo – prach (na zemi); pulvo – střelný prach (tial en Prago: Pulva turo, ne polva!); pulvoro – prášek (lék); pudro – pudr, líčidlo
premi – tlačit, mačkat, tisknout; presi – tisknout (v tiskárně); premo – tlak; preso – tisk; tisk (noviny) – gazetaro; prezo – cena
provo – pokus, pruvo – důkaz. Tiu ĉi provo nenion pruďas.
reĝo – král; reĝi – kralovat; rego, regado – vláda (činnost); registaro – vláda (kolegium ministrů); regi – vládnout, regno – vladařství říše; raĝo (raĝaro) – radža; rajo – rejnok
roso – rosa, rozo – růže; rosino – rozinka
sento – cit, senco – smysl; sentumo, neologisme senso: smysl (korpa organo; la kvin sensoj); dusenca: dvojsmyslný. Sensaco – počitek; sensacio – senzace
ŝarĝi – nabít, nabíjet (zbraň); ŝarĝi – naložit; ŝarĝi ĉevalon per sako; ŝarĝi veturilon; li ŝarĝis (zatížil) sian poklon per plaj impostoj; konscienco ŝarĝita zatížený) per mortigo; ŝi ŝarĝis lin (uložila mu) per unu tasko
serĉi – hledat; ŝerci – žertovat
stato – stav; postavení; ŝtato – stát; statisto – statista; ŝtatisto, ŝtatviro – státník; postavení ve smyslu poměry: situacio; situo – poloha (bela situo de la domo en la valo). Etato status, výkaz (o stavu). Stav ve smyslu povolání: profesio. Být v stavu – esti kapabla, kapabli. Stav tkalcovský – teksilo. Být v jiném stavu – esti graveda. Stav – en la senco de societo de sammetianoj aŭ samprofesianoj, posedanta la rajton de leĝa persono: korporacio. Ŝtato kun korporacia reĝimo. Mezepoka asocio inter korporacioj (ekz. de metiistoj): gildo – cech
tablo – stůl; tabulo – deska, tabule; prkno (ligno) tabulo; tabelo – tabulka přehled, seznam. Tabelo de rekordoj – tabulka rekordů.
Rim. La signo (Z) signifas la aŭtorecon de Zamenhof.

PROGRAMO DE LA KLUBKUNVENOJ por SEPTEMBRO kaj OKTOBRO:

- 6. 9. Pri la proverboj – Patera
- 13.9. Esperanto-aranĝoj en Příbram kaj Pardubice (diapozitivoj) – Kukačka
- 20.9. Vivo en Ĉeĥoslovakio per fremdaj okuloj – Howard
- 27.9. Junulara vespero - Ing. Pečený
- 4.10. Libertempo en Kubo (diapozitivoj) – Vyhlás
- 11.10. Promenado tra Parizo kaj Liono (diapozitivoj) – D-ro Horský
- 18.10. Libertempo en Kubo – 2-a parto (diapozitivoj) – Vyhlás
- 25.10. Junulara vespero - Ing. Pečený

La kunvenoj de la Klubo okazas ĉiulunde de la 18-a ĝis la 20-a horo en la kunvenejo en Zahradní Město, Malinová-strato n-ro 25

En vian kalendareton notu la solenan kunvenon la 23-an de oktobro 1982 en la kulturdomo Gong – sabate de la 10-a horo ĝis noktomezo, dimanĉe antaŭtagmeze!

La rondeto de esperantistoj en Spořilov kunvenas ĉiumarde de la 17-a ĝis la 19-a horo en Praha 4 – Spořilov, Roztylské-placo (klubejo de pensiuloj).

Zaznamenáváme zde radostně mimořádný úspěch našeho samideána F. Brandejse, kterému se konečně – po mimořádném a vytrvalém úsilí – podařilo získat v Praze 1, Vejvodova ul. č. 1 v přízemí – místnosti pro naši klubovnu, v níž hodláme též pořádati dle potřeby, a to již v říjnu t. r., také kursy esperanta.

Dne 20. 8. 1982 jsme již převzali od příslušného OPBH uvedené místnosti a nyní vzniká naléhavá potřeba rozsáhlé, náročné vlastní úpravy místností a jejich přizpůsobení pro naše účely. Bude zde nutno řešit rychle problém vytápění, instalatérské a elektroinstalatérské, tesařské, zednické, malířské a dle potřeby ještě další práce.

Za tím účelem zahájíme ihned brigádnickou činnost, a to většinou o sobotách, ale dle potřeby a možností jednotlivců i během týdne. Každá – i vaše – byť i sebemenší pomoc bude vždy vítána. Doufáme, že nyní, kdy téměř každý si již vyčerpал a ve zdraví užil svoji dovolenou, nám každý dle svých sil a možností rád pomůže s touto svépomocnou činností.

Bližší informace vždy v pondělí na klubových schůzkách nebo kdykoliv u: F. Brandejse, telefon č. 42 35 83, L. Kynčla, tel. č. 83 83 62 a V. Ševčíka, tel. 277 81 75.

Naší společné, pro budoucnost pražských esperantistů důležité práci zdár !!!
